

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

### Redakta komitato:

József Németh (red.)  
Luiza Carol  
Mireille Grosjean  
Luigia Oberrauch Madella  
Rob Moerbeek

### Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Mirella De Martini  
Magdaléna Feifířová  
Heidi Goes  
Xiaofeng Gong  
Mireille Grosjean  
Yasuo Hori  
Tieko Isikawa  
Zsófia Kóródy  
Katalin Kováts  
Bill M. Mak  
Rob Moerbeek  
József Németh  
Radojica Petrović



Josefo,  
dankon pro  
via laboro!



Pastoprenantoj  
de Pedagogia Jago  
Bp. la 25an de  
oktobro 2014.

Ködmény Erni  
Gulovici L. Erni

Medvedeva Nalk  
Palma  
George

felmegy judio  
Gardner H. Bold Erdi Valer  
un

Bluzio Vaha  
Tóth Mária

Nikotaj  
Götel Fokonyi  
Herrmann  
Skerbel Jozsef

Jozsef Hoss  
Belofski Fodor E. Arhe Garkos  
Zsuzsanna Juas

P. K. 3 / Peto Niela  
(Halle Erni)  
Zoltan Jozsef

de kin kind  
sevan j. zeller  
(2014) Seraphine Kemp Eirho  
Rozyni Annel





*Gajnintoj de la fotokonkurso: unua premio por Marija Belošević (HR) (supre), dua premio por Sonia Daubercies (CH) (sube).  
Bv legi la prian artikoleton en paĝo 33.*



## *Scienca Komitato*

**Prezidanto: Humphrey Tonkin**,  
Usono, University of Hartford;  
AdE<sup>1</sup>

**Vicprezidanto: Detlev Blanke**,  
Germanio, Prezidanto de la Societo  
pri Interlingvistiko

### **Membroj:**

**Duncan Charters**, Usono, Principia  
College, Elsah

**Renato Corsetti**, Italio, Università  
degli Studi di Roma „La Sapienza”;  
AdE<sup>1</sup>

**Probal Dasgupta**, Barato, LRU,  
Indian Statistical Institute, Kolkata;  
AdE<sup>1</sup>

**Michel Duc Goninaz**, Francio,  
Université de Provence; AdE<sup>1</sup>

**Aloyzas Gudavičius**, Litovio, Šiaulių  
universitetas

**Boris Kolker**, Usono; AdE<sup>1</sup>

**Iłona Koutny**, Pollando/Hungario,  
Uniwersytet im. Adama  
Mickiewicza w Poznaniu; AdE<sup>1</sup>

**Stefan MacGill**, Nov-Zelando/  
Hungario, vic-prez. de UEA

**Aleksandr Melnikov**, Rusio,  
Академия Сельскохозяй-  
ственного Машиностроения

**Radojica Petrović**, Serbio,  
Univerzitet u Kragujevcu

**Balázs Wacha**, Hungario, MTA  
Nyelvtudományi Intézet

---

<sup>1</sup> AdE – Akademio de Esperanto

**Titolpaĝe:** Omaĝo al Jozefo NÉMETH,  
nia redaktoro. Li deĵoras ekde 20  
jaroj! Ni volas danki lin. (La titol-  
paĝan salutkarton subskribis la parto-  
prenantoj de la Pedagogia Tago  
organizita de ILEI-HU la 25-an de  
oktobro 2014.)

## *Enkonduko*

*Karaj legantoj,*

Se vi membras en ILEI, se vi abonas nian organon *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR), vi ricevas ĝin kvarfoje jare akurate. Tio okazas danke al la laboro de Jozefo NÉMETH, nia redaktoro. Al li venas tekstoj el diversaj mondopartoj, al li apartenas la tasko rilati kun la prezidanto pri tiuj tekstoj. Rapide kaj efike li enpaĝigas la elektitajn artikolojn laŭ la maksimuma dikeco de la revuo, kiun postulas la prezo de la afranko el Belgio, FEL, al la tuta mondo. Ekde 20 jaroj Jozefo zorgas pri tiu laboro por nia Ligo. Ni danku lin!!!

En tiu ĉi numero vi povos malkovri informojn kaj faktojn pri la abunda subteno de hungaraj esperantistoj al nia Ligo tra la jaroj, ekscii, kiel salti de balbutado al flua parolado, vi legos pri fruktodonaj kursoj kaj kunvenoj, vi certe partoprenos la venontan Esperanto-Sumoon post legado de la priskribo fare de ĝia respondeculo HORI Jasuo (kiel mi faras nun). Eĥoj aperas el Orienta Timoro, Ĉinio, Japanio, Germanio, Slovakio, Hungario, Italio. La Ligo estas tutmonde aktiva.

4 numeroj de *Juna Amiko* aperos en 2015. Nepre abonu tiun valoran instru-helpilon!

Venas la jarfino. ILEI bezonas vian agadraporton, tio estas, ke la sekcioj devas raporti, same la reprezentantoj. Tiel la Ligo povos raporti al ekstermovadaj institucioj, kun kiuj ĝi estas en kontakto. Viaj raportoj estas niaj argumentoj.

Mi deziras al vi agrablan legadon!

*Mireille GROSJEAN*

*Prez de ILEI*

---

## ENHAVO

---

Mireille GROSJEAN: <i>Enkonduko</i> .....	3
<i>Jozefo Németh redaktas nian revuon de 20 jaroj</i> (M. GROSJEAN, K. KOVÁTS) .....	5
József NÉMETH: <i>40 jaroj de ILEI-HU, hungara sekcio de ILEI</i> .....	7
HORI Jasuo: <i>Esperanto-sumoo por nia glora estonteco</i> .....	13
Rob MOERBEEK: <i>Falsaj amikoj en la hispana (2-a parto)+korektoj</i> .....	17
Heidi GOES: <i>Plia instruado en Orienta Timoro</i> .....	19
Bill M. MAK: <i>Lernado kaj instruado de Esperanto en Azio</i> .....	23
<i>El la landoj kaj sekcioj</i> .....	27
– Ĉinio: <i>Kursoj en Siano</i> (GONG Xiaofeng) .....	27
– Germanio: <i>Helpu por nova biblioteko / SALO 9</i> (Zsófia KÓRÓDY) .....	28
– Italio: <i>Esperanto kaj novaj teknologioj</i> (Mirella DE MARTINI) .....	29
– Japanio: <i>La 4a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA)</i> (ISIKAWA Tiekō) .....	30
– Kroatio: <i>Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo</i> (József NÉMETH) .....	31
– Slovakio: <i>Poezia SES-umado</i> (Magdaléna FEIFIČOVÁ).....	32
Mireille GROSJEAN: <i>Pri la fotokonkurso</i> .....	33
<i>Kalendaro</i> .....	34
<i>La 48a konferenco de ILEI: programo, aliĝilo</i> (Radojica PETROVIČ).....	36
<i>Informoj pri ILEI</i> .....	41

---

## ESTRARO DE LA LIGO

---

**Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 7969 709 66. Rilatoj kun Unesko kaj FIPLV. Reprezentanto de ILEI ĉe UEA.

**Vicprez.:** Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso hejmaj: (+49) 5521-5983. E-centroj, ekzamenoj, ALTE.

**Vicprez.:** GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitatoj.

**Estrarano pri financoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

**Sekretario:** Radojica PETROVIČ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. hejma (+381) 32 371053. Konferencoj, rilatoj kun TEJO.

**Vicsekr.:** Magdaléna FEIFIČOVÁ „Fejfi”, Bernoláková 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <ilei.oficejo@gmail.com>. Membro-administrado. Rilatoj kun FEL.

**Estrarano:** Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo. Tel. (+1) 620 9877. <nespa.1990@gmail.com>. Universitatoj. Komisiito por helpi al aliĝpetoj.

**Estrarano:** Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario. <enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365.

Kalendaro, ekzamenoj, multlingva paĝaro [www.ilei-mondo.info](http://www.ilei-mondo.info), varbado.

**Estrarano:** Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>. Lerneja agado.

# Pri IPR: Jozefo Németh redaktas nian revuon de 20 jaroj!! Ni festu lin!

## Jozefo kaj mi (Laŭ *Esperanto kaj mi* de HORI Jasuo)

Katastrofo! Katastrofa estis la komenco de nia kunlaboro. Mi ne konas persone Jozefon, same li ne min. Post julio 2013 venis por li nova prezidanto kaj por mi nova kunlaboranto; ni devis kaj devas kunlabore prepari kvar numerojn jare de nia revuo. Mi jam verkis por IPR, mi regule legis ĝin, mi sciis, ke sekvi la redaktadon estos unu el miaj prezidantaj taskoj. Katastrofa estis la komenco; fakte samtage kiel la redaktofino mi ricevis dokumenton, kies titolo estis 2013/3, do temis pri la tria numero de nia revuo. Mi komencis korekti sufiĉe ĥaosan amason da tekstoj: titolo iru maldekstren, litertipo estu xy..... tie mankas la retadreso de la aŭtoro... tie vi devas substreki la titolon same kiel tie... Post kelkaj horoj mi sendis la korektitajn du-tri paĝojn al Jozefo. Tamen la dokumento sendita de li al mi entenis la ricevitajn artikolojn cele al legado, aprobo, amputo, rifuzo, prokrasto, felietonigo, resumo... ne engaĝigo!! Do tiam li detale priskribis tion, kion mi devas fari unue, poste, fine. Fine venas tiu kontrolo de harmonia aspekto, kiun mi volis trakti komence. Ni devis iom post iom harmoniigi nian kunlaboron. Mi faris proponojn pri modifoj; kelkajn li akceptis, kelkajn li malkonsilis per tre detalaj kaj trafaj argumentoj kaj konvinkis min. Mi laboras kun kvar diversaj redaktoroj kaj certe Jozefo estas por mi tre ŝatata redaktoro (samkiel Stano MARČEK, kiu zorgas pri *Juna Amiko*): kun Jozefo nia taskodivido estas klara, nia komunikado estas trafa, konciza kaj pozitiva. Li lasas al mi la decidojn: ĉu submeti al la aŭtoro denove, ĉu rifuzi, ĉu prokrasti... Li atentigas min pri diversaj aspektoj teknikaj, enhavaj, tempaj. Redaktoroj estas tre diversaj; kiu decidas pri kio... kiu faras kion... Se redaktoro estas diktatoro, kiu konsultas nenium, la afero ne glatas por la asocio... La revuo IPR estas la organo, la voĉo de la Ligo, do la enhavo estas grava aspekto, kiu ĉefe kuŝu en la manoj de la prezidanto. Pro tio, ke *Juna Amiko* ne estas la organo de



la Ligo, mia kunlaboro kun Stano havas alian guston. Por revuo de instruista Ligo la kvalito de IPR enorme gravas. Niaj legantoj poluras siajn lingvokapablojn legante IPR-n. Jozefo havas atentemajn okulojn al lingvaj kaj grafikaj aspektoj. Poste sekvas tri korektantoj cele al aperigo de perfektaj tekstoj. Elkora danko iru al ili: Luigia OBERRAUCH MADELLA, Luiza CAROL kaj Rob MOERBEEK. Ĉu ni sukcesas eldoni seneraran revuon? Mi tre esperas.

Do Jozefo! Koran dankon pro via valora laboro! Jam de 20 jaroj vi zorgas pri nia revuo!! Gratulojn!! Mi esperas, ke la Ligo povos ankoraŭ longe tiom fidele kaj efike kunlabori kun vi kaj mi esperas, ke iam ie ni renkontiĝos!!!

## **Malfermaj leteroj por la redaktoro**

*Kara Jozefo,*

En la nomo de ĉiuj Esperanto-instruistoj, abonantoj kaj legantoj de IPR, kaj membroj de edukado.net mi kore salutas vin okaze de la 20-a jardatreveno de tio, ke vi estas nia redaktoro. Ni kore dankas vin pro la farita laboro, per kiu vi disponigas al ni valorajn materialojn. Ni tre aprecas, ke dum tiu periodo la revuo ĉiam seninterrompe kaj akurate aperis.

*Kaj jen miaj privataj pensoj, kara Jozefo:*

Mi kiel via instruistino en la E-fako en Szombathely (1991-1994, *vd. la sekvapaĝan foton*) tre fieras pri vi kaj via laboro. Kiam antaŭ 20 jaroj necesis, ke iu pluportu la torĉon kaj IPR ne perdiĝu, mi proponis vin kiel redaktoron, konante viajn kvalitojn. Mi ne eraris. La iama diligenta studento, kiu ĉiam strebis je precizeco, akurateco kaj bona laboro, same agis ankaŭ kiel redaktoro de IPR. Kvankam mi en la unuaj 10 jaroj kiel vic-redaktoro staris apud vi, la plimulton de la taskoj ĉiam vi faris. Viaj praktika laboro kaj spertoj, kiel tiuj de instruisto de E-o en elementa lernejo, tiuj de organizanto de deklamkonkursoj kaj internaciaj klasinterŝanĝoj, kursoj kaj aliaj programoj donis al vi vastajn okulojn por rimarki kaj apreci la multflankan laboron de niaj kolegoj dise en la mondo. Tial ni havas en IPR teoriajn artikolojn, raportojn pri eventoj kaj priorganizajn materialojn en bona proporcio. Vi estas unu el inter ni.

Mia persona deziro por la bono de la komunumo estas, ke vi restu ankoraŭ longe la redaktoro, scivolu elprovi novajn vojojn kaj formojn kaj kuraĝu

intertrakti kun la kolegoj laŭ iliaj meritoj kaj malfortoj, por povi atingi la komunan celon.



*Parto de la studentoj de la E-Fako en Szombathely kun la ricevitaj mezgradaj ILEI/UEA-diplomoj en 1991 (de maldekstre): Ildikó Renge, Istvánné Magyar, János Kirsch, Tibor Budai, Katalin Kovács, Csaba Németh, József Németh, Attiláné Kovács, Judit Nehéz.*

Nun mi kaptas la okazon publike anonci, ke agnoskante vian 20-jaran laboron por IPR mi la 15-an de Decembro 2014 enirigas vin en la Panteonon de *edukado.net*, por ke vi estu inter la meritplenaj E-instruistoj, pri kiuj ni fieras kaj memoru ĉiam. Bonvenon.

*Amike, viaj eksa intruisto kaj kunlaboranto ĉe IPR, sed eterna amikino,  
Katalin KOVÁCS*

## **40 jaroj de ILEI-HU, hungara sekcio de ILEI**

---

**Komencoj:** La unuan mencion de nia sekcio mi trovis en IPR 1974/1. Tiam la sekcion gvidis Marta CSER. En 1978 la gvidado transiris al la eminenta koleginino Zsuzsa BARCSAY, kiu estris la sekcion ĝis 1984. Laŭ la numero IPR 1985/1, komence de 1985 ni ne havis sekcion (almenaŭ sekciestron ne). Sed jam en IPR 85/2 ni reaparas: la torĉon prenis tria eminentulo, Márta KOVÁCS.

**IPR kaj ILEI-HU:** Dum la lastaj 30 jaroj ILEI, kaj ene de ĝi IPR, forte ligiĝas al la hungara sekcio kaj hungaraj esperantistoj. En 1985 ILEI ekhavis tute novan estraron, la prezidanto iĝis hungaro, István SZERDAHELYI, la fondinto kaj gvidanto de la E-fako de ELTE (*Eötvös Loránd Tudományegyetem*) en Budapest. Ekde la numero IPR 1986/1 la revuon redaktas hungaroj. La unua en la vico estis István SZERDAHELYI. Dum tri sinsekvaj jaroj ILEI perdis tri gravajn kolegojn: en 1985 forpasis nia sekretario Mario DAZZINI, en 1986 la pli frua prezidanto Helmut SONNABEND kaj en aŭgusto 1987 forlasis nin ankaŭ István SZERDAHELYI. Sed la redaktadon li transdonis al sia disĉiplo István ERTL jam komence de 1987. Laŭ la numero IPR 90/2 aperas alia hungara ILEI-ano en la redakta teamo (kiel teknika redaktisto): Stefan MACGILL, tiama vicprezidanto de ILEI. Ekde la n-ro 91/2 aperas plia hungaro ĉe IPR: Márta KOVÁCS, kiel dua teknika redaktisto. La unua prezida periodo de Stefan MACGILL estis en la jaroj 1991-1993. Ekde la numero IPR 92/1 Márta KOVÁCS estas jam redaktoro, ŝian laboron helpas Stefan MACGILL kiel vicred. (István ERTL tiam iĝis redaktoro de *Esperanto*). Márta KOVÁCS redaktis 11 numerojn, sed fine de 1994 pro personaj kialoj ŝi devis rezigni. IPR 94/4 pretiĝis fare de Stefan MACGILL. Aŭtune de 1994 ILEI-HU havis kunvenon kaj la ĉeestantaj funkciuloj transdonis la redaktajn taskojn al kvina hungara redaktoro Jozefo NÉMETH. Tio estis antaŭ 20 jaroj. Mian laboron 11 jarojn longe helpis la sesa hungara redakciano Katalin KOVÁTS, kiel vicredaktoro. Sed dum tiuj 20 jaroj ankaŭ aliaj hungaroj helpis min, i.a.: Ervin FENYVESI, Mónika MOLNÁR, Géza KURUCZ, Johano KIRSCH, Blazio VAHA. Ekde 2004 ni havas redaktan komitaton kaj titolpaĝe ni listigas ĉiujn kunlaborantojn de la aktuala numero.



*[Márta KOVÁCS salutas min en la nomo de ILEI-HU okaze de la jubileo. En mia maldekstra mano estas la salutkarto videbla titolpaĝe.]*

**Revenante al ILEI-HU mem:** Post iom pli ol 15 jaroj da ekzisto fondiĝis la jure registrata asocio *Eszperantista Pedagógusok Magyarországi Egyesülete* (*EPME*, Asocio de Esperantistaj Pedagogoj en Hungario) antaŭ 25 jaroj



en 1990 (la ŝtata agnosko datiĝas en februaro 1991), la estraron gvidis Márta KOVÁCS. En 1990 ni estis unu jaron post la reĝimŝanĝo, Esperanto prosperis en la lernejoj. Anstataŭ la rusa, kaj manke de instruistoj pri la germana kaj angla, plurcent bazlernejoj elektis Esperanton kiel la unuan (kaj solan!) fremdlingvon. Nur en mia urbeto Pápa (kun 30 000 loĝantoj) en du lernejoj komencis lerni ĝin 120 infanoj (en la 4-a klaso). En mia lernejo estis 70 gelernantoj en tri klasoj. Ili lernis la lingvon 5 jarojn longe. Post la fino de la studado 9 lernantoj trapasis mezgradan ŝtatan lingvoekzamenon. Dum la 10 jaroj de la E-instruado en nia lernejo en la 4 diversaj landaj konkursoj ni akiris 17 unuajn lokojn. (Pri du konkursoj el inter tiuj 4 vi povas legi du artikolojn<sup>1</sup> de Géza KURUCZ en IPR).



*Partoprenantoj de la Pedagogia Tago de ILEI-HU (25 Oktobro 2014, Budapest)*

---

<sup>1</sup> Géza Kurucz: Konkursoj, kiujn aprobis la praktiko. IPR 1995/1 p. 16-18.;1995/2 p. 30-32.

En la lernojaro 1991/92 en Hungario Esperanton lernis 740 bazlernejanoj, 680 mezlernejanoj kaj 170 studentoj en altlernejoj kaj universitatoj. Sed 5 jarojn poste la cirkonstancoj ĉiam pli kaj pli malboniĝis kaj nuntempe la enlerneja E-instruado preskaŭ ne ekzistas en Hungario. Ni nepre menciui, ke ĉiujare plurmil plenkreskuloj trapasas mezgradan ekzamenon pri E-o, ĉar laŭ hungaraj leĝoj sen lingvokono oni ne rajtas ricevi universitatan diplomon. E-o estas la tria plej granda lingvo post la angla kaj germana el tiu vidpunkto. Sed el tiuj plurmil preskaŭ neniu eniras la movadon. (Ili donos almenaŭ laboron al multaj hungaraj E-instruantoj, sed granda parto de tiuj kolegoj ne membriĝas en ILEI-HU.)

5 jarojn post la fondiĝo ankaŭ ILEI-HU travivis krizon. La asocio havis ŝuldojn, administrajn kaj financajn problemojn. En 1995 la sekciestro, pro personaj malfacilaĵoj volis ĉesigi la laboron, sed ni ne sukcesis trovi novan sekciestron, do, provizore ŝi restis unu jaron pli. En 1996 la asocion minacis malfondiĝo. Por savi la situacion unu jaron post la transpreno de la redakta laboro mi transprenis ankaŭ la gvidadon de la asocio. Post persista – komence senespera – laboro mi sukcesis atingi, ke oni nuligis niajn ŝuldojn, kaj anstataŭ pagi monpunon, ni eĉ rericevis monon. La financa stato de nia asocio ekde tiam estas stabila.

***Pri la membraro:*** en 1996 mi heredis la dokumentojn de nia sekcio, precipe tiujn, kiuj naskiĝis post la oficiala fondiĝo en 1990, mi fosis profunde, ne senrezulte kaj trovis indikojn pri parto de la komencaj jaroj. En la n-ro 1991/2 mi trovis artikolon<sup>2</sup> de Bertil ANDREASSON pri la jaroj 1984-1990 (interkrampe la membronombroj). 1984 (3), 1985 (10), 1986 (47), 1987 (31), 1988 (42), 1989 (40), 1990 (53).

***Notoj:*** 1) Rigardante la ciferojn oni povas supozi, ke en la komencaj 10 jaroj de nia ekzisto la membronombro estis sub  $10^3$ . 2) En la sama numero nia sekciestrino Márta KOVÁCS aperigis detalan analizon<sup>4</sup> pri tiuj 11 sekcioj, kiuj resendis la jaran demandilon. Interese, ke en ŝia analizo ILEI-HU havas 57 membrojn, kaj ne 53 kiel ĉe Andreasson. La malsamaj ciferoj tie kaj en mia suba analizo povas veni el la faktoj, ke kelkaj kolegoj membriĝis en la hungara sekcio, sed ne en ILEI mem, krome, kelkaj abonis

---


<sup>2</sup> Bertil Andreasson: Evoluo de la membraro de ILEI. IPR 1991/2 p. 38-39.

<sup>3</sup> La varbadon de hungaroj malfaciligis ankaŭ la problemoj pri la transpago de kotizoj. Laŭ: Márta Kovács: La lastaj dek jaroj de ILEI. IPR 1987/ p. 2-8.

<sup>4</sup> Márta Kovács: Pri la sekcioj de ILEI en 1990. IPR 1991/2 p. 22-24.

IPR-n, sed ne membriĝis en la asocio. Laŭ nia statuto, plenrajta membro devas esti ankaŭ membro de ILEI, tiel instigante la kolegojn aparteni al ILEI. Tiujn, kiuj ne membriĝas en ILEI, ni nomas „apogantaj membroj” kaj ili ne havas voĉdonrajton en niaj jarkunvenoj.

Traserĉadi la asocian arkivon ne estis facila afero, sed mi faris tion nun por vi, kaj trovis la jenajn indikojn<sup>5</sup> pri nia membraro en la pasintaj 30 jaroj: 1985 (11), 1986 (47), 1987 (38), 1988 (56), 1989 (46), 1990 (63), 1991 (53), 1992 (60), 1993 (68), 1994 (45), 1995 (45), 1996 (35), 1997 (42), 1998 (43), 1999 (45), 2000 (39), 2001 (49), 2002 (45), 2003 (38), 2004 (39), 2005 (41), 2006 (46), 2007 (55), 2008 (57), 2009 (58), 2010 (61), 2011 (57), 2012 (56), 2013 (56), 2014 (46).



Do, la suma membronombro de ILEI-HU en la lastaj 30 jaroj averaĝe estas 48 (kune kun la nur-enlandaj membroj). (Vidu la grafikaĵon!) La statistiko

<sup>5</sup> Post tiom da jaroj ne ĉiam estas facile kompreni la diversajn listojn kaj dokumentojn. Miaj ciferoj pri la membronombro, koncerne la komencan periodon, kiam la sekcio gvidis ne mi, povas enhavi eraretojn.

enhavas ankaŭ la nur-enlandajn membrojn de EPME! Ekz. en 2013 el la 56 membroj nur 51 membriĝis ankaŭ en ILEI.

Pluraj iamaj eminentuloj jam forpasis, i.a. Zsuzsa BARCSAY (2000), Zsuzsa CSISZÁR (2002), Tibor PAPP (2003), Gabriella ŐSZ (2003), Balázs SZEMŐK (2005), Tivadar KERESZTHEGYI (2006), János SÁRKÖZI (2007), Johano KIRSCH (2012), Péter András RADOS (2012), Ernő KÖNCZÖL (2014).

Vivante eksterlande kelkaj iamaj membroj fortigas aliajn sekciojn de ILEI: ekz. Ilona KOUTNY en Pollando kaj Zsófia KÓRÓDY en Germanio. Aliaj eminentaj „elmigrintoj” restis fidelaj al ILEI-HU: vd. Mónika MOLNÁR en Svislando kaj Katalin KOVÁTS en Nederlando.

**Pri la agado de nia sekcio:** la 45 jarkolektoj de IPR inter 1970 kaj 2014 abunde raportas pri la sekcia agado, kaj eĉ pli abunde pri la persona, ekstersekcia agado de niaj membroj. Estus vana kaj superflua peno nun kolekti ilin, sed se vi tamen interesiĝas pri la temo, komencu la serĉadon per la trastudo de la ekzistantaj indeksoj de IPR<sup>6</sup>. La plej grava kaj ofte preskaŭ la sola komuna aranĝo estas la landa pedagogia tago. En la jaro, kiam nian asocion oni jure registris, oni jam organizis la 6-an pedagogian tagon, kun 48 partoprenantoj. La komencajn 6 pedagogiajn tagojn organizis Hungara E-Asocio (HEA), sed ekde la jaro 1992 ILEI-HU transprenis la organizan taskon. Tiuj aranĝoj (fakte konferencoj, seminarioj) ofte estis dutagaj. En 2004 ni interkonsentis, ke ili okazu dufoje jare. En 2008 ni jam organizis la 24-an pedagogian tagon. (Poste ni ne plu numeris la tagojn.)

Konkursante por subvencio<sup>7</sup> en 2006 ni gajnis monon kaj eldonis libron kun la titolo *Magyar Eszperantó Tanítók Arcképcsarnoka* (Portretaro de Hungaraj E-Instruantoj), kiu helpas la kontaktojn kaj informadon ene de la asocio. En la libro oni povas trovi ekz. la sekvajn indikojn: naskiĝdato, loĝadreso, telefono, retadreso, hejmpaĝo, profesio(j), parolataj lingvoj, E-ekzamenoj, membreco en E-organizaĵoj, E-movada agado, E-instrua agado, proponoj por evoluigi la E-instruadon. Uzante la ricevitajn subvenciojn ni aĉetis ankaŭ teknikajn ilojn. Alia entrepreno de la sekcio estis la eldono de


---

<sup>6</sup> Kovács Márta: Indekso por la jarkolektoj de IPR 1980-1990. IPR 1991/1 p. 10-17;  
József Németh: Indeksoj por la jarkolektoj de IPR 1991-95. IPR 1996/1 p. 10-16;  
József Németh: Indeksoj por la jarkolektoj de IPR 1996-2000. IPR 2001/1 p. 22-31;  
József Németh: Indeksoj por la jarkolektoj de IPR 2001-2005. IPR 2006/1 p. 27-36.

<sup>7</sup> Ĉe *Nemzeti Civil Alapprogram* (nacia civila fondaĵo)

disko „Esperantologiaj fragmentoj” memore al István SZERDAHELYI kaj Zsuzsa BARCSAY. Temas pri enkomputiligo de sonregistraĵoj de Zsuzsa Barcsay, kiujn ŝi faris en la jaroj 1972/1974 kiel studento de István Szerdahelyi. La sonmaterialo aperis sur diskoj kaj ĝi estas aŭskultebla ankaŭ rete<sup>8</sup> en la hejmpaĝo de ILEI-HU. La materialon kompilis Márta KOVÁCS, la enkomputiligon kaj produktadon entreprenis József NÉMETH.

La lasta jarkunveno de ILEI-HU okazis la 25-an de oktobro 2014. Ni akceptis la raporton pri la pasintaj 3 jaroj kaj elektis novan estraron por la sekvaj 3 jaroj: Attiláné KOVÁCS, József NÉMETH (sekciestro), Pálma SALOMONNÉ CSISZÁR kaj Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ. Samtempe okazis Pedagogia Tago kun 35 partoprenantoj. Al la programo kontribuis: Iván BUJDOSÓ, Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ, Katalin KOVÁCS, Blazio VAHA, Pálma CSISZÁR SALOMONNÉ kaj László SZILVÁSI. Kadre de la evento ni transdonis la diplomon de UEA al Éva FARKAS-TATÁR [vd la foton], kiu jam ekde 50 jaroj estas membro de UEA. Krome la partoprenantoj salutis la sekciestron pro lia 20-jara jubileo kiel redaktoro de IPR.



*József NÉMETH, Hungario*

## **Esperanto-*sumoo* por nia glora estonteco**

---

(Mallonga versio. Kompletaj versio legeblas sur la retejo [www.ilei.info](http://www.ilei.info))

### **Kio estas *sumoo*?**

*Sumoo* estas japana tradicia lukto. La suba ukijo (lignopresaĵo) estis farita antaŭ 200 jaroj, sed ankoraŭ nun luktistoj luktas same kiel en ĝi. Luktisto venkas, kiam li faligas la konkuranton teren aŭ puŝas lin ekster la ringon. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭras 15 tagojn.

### **Lanĉo de Esperanto-*sumoo***

En la Esperanto-*sumoo* mi decidis jenajn regulojn:

---

<sup>8</sup> <http://www.ilei.info/hungario/sonmaterialoj.php>.